



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

ENHAVO n-ro 23 • Hungario • Poezio • Fulmkurso • Zimbabvo • BET <apr. 19

Hungaria Esperanto-Asocio 120-jara

Ni resumus prezenton de estrarano de HEA al la festa kunveno en la 12-a de aprilo.

En Hungario Esperanto estis menciita jam en la jaro 1897. Sekvajare aperis la **unua lernolibro** verkita por hungaroj fare de Ábel Barabás. La monata gazeto **Lingvo Internacia** (eldonita en Svedio) ekde 1900 estis pretigata en la presejo de Paŭlo Lengyel (pron.: lendjel) en la urbo Szekszárd (seksaard). Sekvajare li jam estis ankaŭ ĝia eldonisto. Tiam ekabonis la gazeton Jozefo Miletz (milec), kiu fondis societon.

La fondiĝo okazis en la komenco de marto 1902. **Ties daton festos nun ni, hungariaj esperantistoj.** La nomo de la Eo-hungarlanda organizaĵo kelkfoje ŝanĝiĝis, ĝis la nuna nomo: Hungaria Esperanto-Asocio (ekde 1991). En Budapeŝto la unua **Esperanto-gramatiko** aperis en aprilo 1903. En 1903 en la centro de Budapeŝto komenciĝis la unua Esperanto-kurso sub la gvido de Miletz. En 1910 en alia parto de la ĉefurbo okazis kurso fare de Géza Nyulászy (geeza njulaasi).

En 1932 fondiĝis **Societo de Hungaraj Esperanto-Pedagogoj**. Inter 1964 kaj 1969 okazis **Internaciaj Seminarioj** de Esperanto-Pedagogoj en la urbo Szeged (seged) somere dum 10 tagoj. Ekde 1966 eblas **ekzameniĝi** ankaŭ pri Esperanto. Samjare komenciĝis la Esperanto-instruado en la budapeŝta **universitato ELTE** por havigi al la studentoj diplomon pri mezlerneja instruado.

En 1922 (antaŭ 100 jaroj!) pluraj eminentuloj fondis la faman beletran revuon **Literatura Mondo**, kiu iĝis la plej konata literatura kaj arta organo de la Esperanta kulturo, kerno de la t.n. „Budapeŝta Skolo”, kies spirita gvidanto estis unu el la fondintoj, Kolomano Kalocsay. Dum la jaroj aperis multaj libroj: originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj krom la du granduloj – Kalocsay kaj Baghy – kun la kontribuo de pluraj talentaj verkistoj kaj tradukistoj.

En 1983 oni eldonis la kolektaĵon **Hungara Antologio**, el kies partoj du jarojn poste aperis la unua esperantlingva sondisko **Bukedo el la hungara poezio**. En 1987 estis prezentita en la jubilea kongreso en Varsovio la unua postsinkronigita hungara filmo **En Eŭropo ie**. Esperanto **radio-elsendoj** komenciĝis en 1939, poste okazis: 1947-49, 1966-69, 1982-89. En 1982 la fama **Kolektaĵo Fajsz** iĝis ŝtate aŭspiciata,

nuntempe ĝi troveblas en la Landa Fremdlingva Biblioteko, en Budapeŝto; plie okazis la unua Internacia Festivalo de Esperantaj **Teatroj** en la ĉefurbo.

La (tiam) Hungara Esperanto-Asocio estis la unua inter la enlandaj organizaĵoj, kiu ricevis la ordenon **Paco kaj Amikeco**, en la jaro 1987, pro agado pri internacia paca kunlaboro. Budapeŝto trifoje gastigis Universalajn Kongresojn :

1929 (1200 partoprenantoj),

1966 (3975 partoprenantoj),

1983 (4834 partoprenantoj).

La gvidantoj kaj la anoj de la landa asocio ĉiam aktive kaj entuziasme partoprenis en la organizado de tiuj gravegaj eventoj, samkiel en aliaj poresperantaj okazaĵoj. Tiam sintenon ni devas havi nun kaj en la estonteco, tio estas nia celo. Okaze de la 120-a datreveno, la estraro de HEA aperigis festan poŝtmarkon kun la hungarlingva teksto '120 éves a MESZ' (HEA estas 120 jara).

Gyöngyi Mézes (Perla Mielo), en la nomo de la estraro de HEA

Nova hungaria kurso ekzamencele

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo:

Nomo: De nulo ĝis la ekzameno KER-B2 - en Lingvo-Studio

Gvidantonomo: Szilvási László

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Budapeŝto , Hungario

Aldoninto: eventoj

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27414>

Ni planas reveni al tiu festa kunsido, ekzemple por resumi brilan festparolon de honora prezidanto, d-ro Halasz Jozsef.

Paradizo por poem-amantoj refoje

En EKO 8 ni alkroĉis la antaŭan numeron de *Panseo*. Jen la nova, *Panseo* 366 freŝa el kapabla redakto en Ĉinio.

Fulma Eo-kurso en Hispana universitato

La UEA-komitato, Dennis Keefe, plenumis prelegon pri Esperanto en la Universitato de Valencio, Hispanujo. Oni ankaŭ parolis pri la bezono, ke la ILEI-sekcioj pli intense okupiĝu pri la instruado de Esperanto en siaj teritorioj. Krome estis preparolataj la retaj kursoj de ILEI en la araba kaj en la hispana por Suda Ameriko.

La prelego kune kun fulmo-kurso pri Esperanto altiris iom pli ol 20 homojn, inter ili 7 esperantistojn, 9 studentoj pri hispana filologio (kelkaj el kiuj estas eksterlandanoj), 2 aŭ 3 profesoroj, kaj ankaŭ la estron de la fako filologio. El tiu grupo 7 volas ĉeesti pliajn lecionojn pri Esperanto, kiujn mi mem donos en la formo de kafejo-kurso.

Restas elekti la tagojn kaj la horon.

Afrike virinoj agadas kaj multas

Ĉiun sabaton je la 11a horo en Baraka (Kongo DR) kaj Parizo (UTC+2), okazas kurso por komencantoj (por studentoj, asistantoj, profesoroj). La 13-a leciono el 20



okazis la 9-an de aprilo. Vidu kiom da virinoj en la grupo! Ni rompu la stereotipon, ke nia afrika movado plenas je preskaŭ nur viroj. Tio veris antaŭ dudek jaroj, jam delonge ne. Aliĝu al nia grupo en *WhatsApp* por ricevi la informojn (ligilon al Zoom kun la pasvorto, lern-materialon, hejmtaskojn, individuan akompanadon en lernado.)

Esperanto-kurso por afrikaj studentoj el UEC (Université Espoir du Congo)

En posta EKO-komuniko ni plie komunikos pri tio.

Zimbabvo vekigās movadmape

Jen lando, kiu dum jaroj ne havis en UEA eĉ unu membron. Kaj nun, jen klubo en la ĉefurbo! La afrika komisiono vere laboras kaj stimulas rezultojn!



Ukraina helpilo por fuĝintoj celata

Ĝis nun jam pli ol 10 % de la ukrainia loĝantaro, pli ol 4 milionoj da homoj, rifuĝis el sia patrujo. La plimulto de la rifuĝintoj alvenis en Pollandon, Slovakion, Hungarion, Rumanion kaj Moldavion. Multaj rifuĝintoj veturis/veturas plu al Aŭstrio, Germanio, Francio kaj Italio, kaj multaj el inter ili parolas nur la ukrainan lingvon.

Pretiĝis la elektronika manuskripto/dosiero de la unua tri-lingva, angla-esperanta-hispana kuracista tradukhelpilo surbaze de la 2-a eldono de la valora libro de D-ro Gert Hoyer kaj D-rino Uta Hoyer, sub titolo *Aerztlicher Dolmetscher*. Ni sendis ĝin al niaj germanaj kolegoj, por ke ili prezentu ĝin al la aŭtoroj, kaj akiru ilian permeson, ke la komunumo de UMEA havu la rajton pretigi ankaŭ la anglan-esperantan ukrainian varianton. Poste ni planas pretigi kaj disvastigi ankaŭ aliajn, bezonatajn variantojn, ekzemple la anglan-esperantan-polan, anglan-esperantan-slovakon, kaj... plianj. Kiujn avantaĝojn havus la pretigo kaj disvastigo de tiuj ĉi 24-paĝaj kajeretoj/tradukhelpiloj? Tio helpus al kuracistoj komuniki rekte kun ukrainaj pacientoj, en la propra lingvo aŭ alia lingvo konataj al ili.

Prezidanto Charters en Litovio

Ĉi-somere, unuafoje en la historio de BEToj, en la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos de la 9a ĝis la-17a de julio en la Litovia havenurbo Klajpedo, partoprenos la prezidanto de UEA, Duncan Charters. Legu pli en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2022/04/bet-124/>

EKO nur post pasko ekos denove

Ni malintensigis la ritmon de EKO-komunikoj por finfine komati iom niajn longe suferantajn legantojn kaj kontrolantojn. Multaj legantoj festas la paskan periodon; eĉ nekredantoj okazigas familiajn renkontiĝojn kaj sesiojn de tro abunda manĝado! Do, nur post la festotagoj alvenos ĉi tiu 23-a komuniko.



===== vortoj: 1070 =====

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014. Afiŝigo por 2022 sekvos baldaŭ!

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.